

Redakta Komitato: D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich,
D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.
Ĉefa kaj respondeca redaktoro Prof. B. Popović, Teknika fakultato,
NIŠ, Jugoslavio

Lingva kontrolanto Prof. M. Ŝaponjić, Svetosavska 23/I,
BEOGRAD, Jugoslavio

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2
dol. = 25 N. Din

Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkotizo 10 steloj)

La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje nauĉna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije, Dobrinjska 12,
Beograd (=jugoslovenska podružnica Međunarodnog nauĉnog društva
esperantista). Za izdavaĉa: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović,
(Tehniĉki fakultet, Niš)

ŝtampano u Grafiĉkom preduzeću »ŠTAMPA«, Sarajevo; za ŝtampariju
Simo Bunĉić.

SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92
Vol. 17
N-ro 3-4 (67-68)
30. 11. 1966.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 25 N. Din

050.4 : 001 + 62 : 408.92

KIA(J)N SCIENCA(J)N REVUO(J)N NI BEZONAS EN ESPERANTO

(B. Popović, Niš, Jugoslavio)

Celo de la artikolo kaj la esencaj demandoj

»Scienca Revuo« baldaŭ fariĝos 20-jara (ne kalkulante ĝian antaŭulon, **Internacian Sciencan Revuon!**). Jam estas la tempo pridiskuti ĝenerale la problemon de sciencaj revuoj en Esperanto, tiom pli ĉar jam ekzistas spicialigitaj sciencaj revuoj: **Medicina Internacia Revuo** kaj **Kemio Internacia**, kaj kelkaj aliaj estas planataj (aŭ almenaŭ oni provadis kaj provadas aperigi tiajn revuojn). Krom ĉio tio aperas jam konata spicialigita popularsciencia revuo **Homo kaj Kosmo**.

En kelkaj lastaj jaroj oni faris iujn rimarkojn kaj oni donis plurajn sugestojn por reorganizo de Scienca Revuo kaj ĝenerale pri sciencaj revuoj en Esperanto. La celo de ĉi tiu artikolo estas sumigi la ĝisnunan tiuspecan diskuton, sed ne fini ĝin — kontraŭe: eniri pli profundan kaj samtempe pli konkretan diskuton, kiu dum du jaroj

kristaligos opiniojn kaj donos pli fundamentan solvon de la problemo pri sciencaj revuoj en Esperanto. Surbaze de tiel trovota solvo, oni povas fari seriozajn preparojn por nova(j) revuo(j), al kiu(j) oni povas plane transiri tuj post la 20-a volumo de la nuna Scienca Revuo. Nenio estas pli malbona ol fari oftajn, nesufiĉe pripensitajn, ŝanĝojn. La ŝanĝoj estas necesaj en ĉio vivanta, ankaŭ en la revuo, sed oni devas antaŭe pristudi ilin: Kaj ni faru tion!

Kiam oni deziras pritrakti la problemon pri scienca revuo en Esperanto, oni devas konsideri multajn flankojn de problemo kaj plej kontentige respondi al multaj demandoj. Mi klopodos grupigi la demandojn kaj ne tro dispecigi la problemaron. Jen grupoj de la pritraktataj demandoj:

Enhavo laŭ la sciencaj branĉoj,
Enhavo laŭ la scienca nivelo,
Ligiteco kun neesperantistaj scienculoj,
Redaktado, administrado kaj financado.

Enhavo laŭ la sciencaj branĉoj

La scienco konstante dispartiĝas en pluraj sciencaj branĉoj. La fakulon de difinita scienca branĉo interesas plejparte la artikoloj el lia (ŝia) branĉo, kaj nur duavice kaj supraĵe aliaj artikoloj. Pro tio estas memkomprenebla tendenco krei ankaŭ en Esperanto revuojn pri ĉiu fako aparte. Tiun tendencon kaj la procezon oni ne povas haltigi. Kiel ajn oni decidus pri nur unu, ĝenerale scienca, plurfaka revuo, ĉiam troviĝos homoj el iu fako ne konsentontaj kun tia solvo kaj klopodontaj krei siafakan revuon. Do, **nur unu scienca revuo neniel povas esti solvo de la problemo.**

Estas ne nur danĝere kontraŭstaradi la tendencojn havi estonte revuojn por ĉiu aparta fako, sed estas eĉ utile helpadi tiajn tendencojn, por pli rapida atingo de tia stato ke ankaŭ en la internacia lingvo ekzistu pure fakaj revuoj kiel en la naciaj lingvoj. Esperantistoj akceptas ankaŭ ĝeneralan sciencan revuon, sed neesperantistoj serĉas en aliaj lingvoj (ankaŭ en internacia) preskaŭ nur proprafakan enhavon. Penetri rapide en neesperantistajn rondojn oni povas nur per unufakaj revuoj.

Fakte la plimultego de niaj legantoj konsentas ke estas bone havi fakajn revuojn ankaŭ en Esperanto. Sed multaj ne konsentas ke jam estas tempo por tio. Nur en malmultaj fakoj, dank' al entuziasmo de unuopuloj kaj kun grandega penado, oni povas viviĝi tiajn revuojn (kaj ni ne rajtas bremsi tian entuziasmon!). Fake unufaka revuo povas trovi tre malmultajn legantojn kaj abonantojn inter esperantistoj. Sed aliflanke ĝi povas trovi multajn abonantojn inter

neesperantistoj. Precipe fakaj (kaj plurfakaj) bibliotekoj abonadas preskaŭ ĉion kio aperas en la fakoj, kiuj ilin interesas.

Pro tio estas klare ke ni devas aprobi (ankaŭ helpadi per ĉiuj eblaj vojoj!) ekvivigon de ĉiu unufaka revuo tuj kiam ĝi montros ŝancon por elteni la unuajn paŝojn. Mi estas certa ke en multaj fakoj necesas elteni nur kelkajn unuajn jarojn kaj dum tiu tempo la revuo (se estas bone redaktata, administrata kaj propagandata) firimiĝos kaj restos kiel vere internacia revuo. Tial la samfakuloj esperantistoj devas pli firme interligiĝadi kiel fakaj sekcioj de la Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj tiel organizitaj klopodi krei siafakan revuon. Aperu ĝi, se ne eblas pli ofte, unufoje aŭ dufoje jare, sed ĝi aperu certe kaj prezentiĝu al la samfaka publiko.

Kaj ĉu tio signifas ke ni tute ne bezonas ĝeneralan, sciencan revuon? Tute ne. Tiam revuon ni bezonas daŭre, almenaŭ ĝis la momento kiam oni havos pure fakajn revuojn por plimulto da sciencaj branĉoj. Eble eĉ tiam restos bezono por la ĝenerala revuo, sed tiam kun iom ŝanĝita fizionomio; pritrakti plejparte intersciencajn demandojn, kunligadi sciencajn branĉojn kaj iliajn rezultatojn.

Ankoraŭ du demandoj estis starigitaj kunligite kun tia revuo en la ĝisnuna diskuto. Unu koncernis la teknikon kaj la alia unuecigon de la fakaj revuoj.

Tekniko jam ĉesis esti pura aplikado de scienco, sed ĝi fariĝis ankaŭ scienco. Fakte al pure sciencaj branĉoj aldoniĝis pluraj tekniksciencaj branĉoj. Tio manifestiĝis en jam ne malofta apero de tekniksciencaj artikoloj en la nuna Scienca Revuo kaj en la ekzisto de multegaj teknikistoj-membroj de ISAE. Mi opinias ke ni devas tion evidenti per la nomŝanĝo de la revuo kaj de la Asocio. La jarkunveno en Budapeŝto same subtenis la opinion proponi ke la estonta nomo estu ekz. »Scienca kaj Teknika Revuo« (same »Internacia Scienca kaj Teknika Asocio«).

Kio koncernas la unuecigon de la fakaj revuoj en Esperanto, R. Lewin donis eĉ detalan skriban proponon ke ĉiuj revuoj estu eldonataj sub la sama nomo kaj aspekto, kun aldono de aparta sekcia nomo (kaj la koncerna numero), radaktataj ĝenerale (kun apartaj radaktaj komitatetoj) kaj administrataj en unu centro. La ideo estas certe bona, sed la diskuto dum la jarkunveno de ISAE en Budapeŝto montris ke en la nuna momento tio ankoraŭ ne eblas. Tia aranĝo bremsus la iniciatemon de fakuloj en tiuj fakoj kie ekzistas almenaŭ iomaj eblecoj por ekvivigo de la koncerna faka revuo. Sed la jarkunveno konkludis ke la komuna administrado, per la sekretario kaj la delegita reto de ISAE, plifaciligus la laboron kaj helpus la disvastigon de la fakaj revuoj. Kaj kiam ni jam havos plurajn

fakajn (kaj sufiĉe fortajn) revuojn, oni povas restarigi la demandon pri ilia unuecigo!

Do la diskuto pri ĉi tiu demando donis sufiĉe klaran konkludon: kreadi konstante novajn unufakajn revuojn kaj daŭrigi la eldonadon de la ĝenerala scienca kaj teknika revuo, enhavanta principe la artikolojn el ĉiuj fakoj por kiuj ankoraŭ ne ekzistas la koncerna faka revuo.

Enhavo laŭ la scienca nivelo

Lau la scienca nivelo ekzistas diversaj sciencaj revuoj: popularsciencaj, pure sciencaj (kun nur originalaj esplorrezultatoj), la altfakaj (ne nur la originalaj novaĵoj, sed tamen destinitaj nur por fakuloj) kaj la resumaj (referaĵaj, pri unuopaj artikoloj-novaĵoj aŭ pri superrigardo al la stato de diversaj problemoj).

Pure sciencaj revuoj estas principe nur unufakaj. Krom tio la ĝenerala scienca revuo en Esperanto devos ankoraŭ dum longa tempo kalkuli je larĝa esperantista publiko. Pro tio tia revuo certe ne povas publikigadi nur la originalajn esplorrezultatojn — nepre ĝi devas havi plejparte la popularsciencan karakteron. Sed ĝi ankaŭ ne rajtas tute rezigni la aperigadon de originalaĵoj. Unu-du tiaj artikoloj en ĉiu numero (kaj la nomoj de iliaj aŭtoroj) trovigos al la revuo la vojon al la sciencistoj ne multe interesiĝantaj pri la internacia lingvo (sed interesiĝantaj pri la novaĵoj el ilia fako!).

Kun la aperigado de originalaj sciencaĵoj estas ligita la problemo de iliaj resumoj. Preskaŭ ĉiuj original-revuoj kutimas doni ankaŭ la resumon de ĉiu artikolo, en unu aŭ en pluraj lingvoj. En la nuna diskuto oni proponis ke ankaŭ la Scienca Revuo faru la samon. Kvankam ni pli ŝatas havi nur Esperanton en S. R., tamen estus tute oportune presigi la resumon en naciaj lingvoj, sufiĉus en nur unu lingvo (en kiu la aŭtoro mem resumos la artikolon). Tio pliproksimigus la revuon al la neesperantistoj. Ekinteresiĝonte per la resume, ili tralegos (rekte aŭ per mendo de la traduko) ankaŭ la tutan artikolon. Kaj se estos pluraj tiaj artikoloj, ili nepre ekinteresiĝos ankaŭ por la lingvo, vidonte ke ĝi taŭgas por scienca publikigado.

Se la diskuto pravigos la oportunecon de la resumoj (temas nur pri la originalaĵoj, eventuale ankaŭ pri la plej altnivelaj fakaj artikoloj), tiam ni devas decidi ankaŭ la formon de la resumado: ĉu la resumon doni kun la artikolo (antaŭ aŭ post ĝi), kiel faras la plimulto de la revuoj, aŭ doni ĉiujn resumojn sur aparta folio fine de la kajero — kiel faras iom pli modernaj revuoj, helpante tiel al la bibliotekoj kaj al la dokumentadcentroj (ĉar ili eltranĉas la resumojn kaj kartotekigas ilin).

Kio koncernas al altfakajn artikolojn, sen la originalaj rezultatoj, ili ankaŭ povas trovi sian lokon en la ĝenerala internacilingva revuo. Ili povas esti interesaj por la fakuloj (eĉ por neesperantistoj) kaj parte, almenaŭ supraĵe, ankaŭ por esperantistoj de aliaj fakoj. Nemultaj tiaj artikoloj aperis ĝis nun en la Scienca Revuo. Mi opinias ke oni utilos aperigi ilin ofte. Oni povas konsideri ilin kiel la plej altan nivelon de la popularsciencaj artikoloj (ĉar la popularscienco povas ankaŭ esti pli aŭ malpli altnivela).

Fine pri la referaĵaj artikoloj. Dum la diskuto estis donita eĉ la propono ke la revuoj en Esperanto estu plejparte referaĵaj revuoj. Sed tio estas utopio. La referaĵa revuo povas esti utila (kaj abonata!) nur se ĝi estas pli-malpli kompleta. Tiucele oni eldonas grandegajn volumojn por ĉiuj sciencaj branĉoj, havante kompreneble grandegan kunlaborantaron kaj la administradon. ISAE tion certe ne povas fari, kvankam ni klare vidas ke oni disĵetadas la fortojn farante la saman laboron en kelkaj grandaj dokumentadcentroj, en kelkaj »mondlingvoj«. Unu tia internacia dokumentadcentro, kun la internacia lingvo, estus multe pli fruktodona kaj pli utila por evoluo de ĉiuj sciencaj branĉoj. Sed paroli pri tio nun ne utilas.

En la ĝenerala scienca revuo en Esperanto povus trovi la lokon referaĵaj artikoloj pri la plej novaj atingiĝoj sur diversaj sciencaj kampoj, kunlige kun iu speciale interesa problemo k. s. Tiaj artikoloj povus esti interesaj por la fakuloj kaj por nefakuloj. Pro tio ili estas tre bonvenaj, kvankam mi konscias ke la verkado de tiaj artikoloj estas treege temporaba (kaj kutime oni bone pagas tian laboron por la fakaj revuoj!).

Do pri la enhance laŭ la scienca nivelo oni povas diri ke la revuo devas havi proksimume la ĝisnunan fizionomion. Tio signifas ke ĝi devas esti plejparte popularsciencan, plialtigante konstante sciencan nivelon de tiuspeciaj artikoloj, irante ankaŭ ĝis la plej alta nivelo. Sed ĝi povas kiel ĝis nun enhavi ankaŭ originale esploraĵajn artikolojn, precipe el tiuj fakoj por kiuj ne ekzistas ankoraŭ unufakaj revuoj en la internacia lingvo. Pri la resumoj en naciaj lingvoj oni devas ankoraŭ diskuti pli detale.

Stariĝas ankaŭ ĉe la unufakaj revuoj la demando pri la scienca nivelo. Ili kompreneble devas esti sur pli alta scienca nivelo ol la ĝenerala revuo. Do ili devas havi nur la altnivelajn fakajn artikolojn kaj la rezultatojn de la originalaj esploroj. Popularsciencan enhavon ili ne rajtas havi, ĉar tio forpelus la neesperantistajn fakulojn, al kies altirado tia revuo devas esti destinita plejparte. Kaj la entuziasmuloj-fakuloj devas ne ŝpari la fortojn verki por la unufakaj

revuoj ankaŭ la menciitajn referatajn artikolojn pri unuopaj interesaj temoj.

Ligiteco kun neesperantistaj scienculoj

La celo de ISAE, kaj de ĝia organo Scienca Revuo, estas ne nur plivastigadi interesigon por sciencaj scioj, por la scienca pensado, inter esperantistoj, sed ankoraŭ pli grava estas penetrado de Esperanto en sciencajn rondojn. Pro tio sciencaj revuoj en Esperanto devas esti tiaj ke ili ofte starigas la kontakton kun pli granda nombro de neesperantistaj scienculoj. Kial konstante atingadi tian kontakton. Por la unufakaj revuoj ĉi tio ne estas malfacila afero, nur se ili estas bonkvalitaj, bone redaktataj kaj bone administrataj. Sed por la ĝenerala scienca revuo en Esperanto, la kontakto kun neesperantistoj estas tre malfacila tasko, pro la kaŭzoj pri kiuj jam estis la vorto (kaj kiuj cetere estas bone konataj).

Pensinte ofte pri ĉi tiu problemo kaj kunligante ĝin kun la diskuto pri la estonto de la Scienca Revuo, kaptis min ideo kiun mi ĉi tie prezentos. La ideon oni povas pridiskuti ankaŭ senlige kun la supre menciitaj problemoj, ĉar ni troviĝas jam ĉe la fino de la diskutado, kaj la novan ideon oni nenie ĝis nun diskutis (krom miaj interparoloj kun kelkaj amikoj, kiuj — oni povas diri eĉ entuziasme — subtenis la ideon).

Temas pri la kunlaboro kun la Mondfederacio de Sciencistaj Laboristoj. Post la decido de la jarkunveno 1963. (Sofio) kaj la aprobo de la decido, ISAE aliĝis al la Federacio, sed la akcepto fariĝis definitiva nur post la pasintjara asembleo de la Federacio. La aliĝo restis fakte nur la deklara, sed mi esploris la problemon pri la kunlaboro kun la Federacio kaj al mi ŝajnas ke oni povas krei tre bonajn interilatojn kun ĝi, per kio oni kreas la eblecon por la kontaktoj kun centmiloj da scinculoj en la tuta modno. Tiucele mi utiligis la inviton al la kunvenoj de la Plenumkomitato de la Federacio, kun kiu estis ligita la festkunveno okaze de la 20 jaroj post fondiĝo de la Federacio kaj la solena inaŭguro de la grandega (12-etaĝa) Internacia domo de sciencistoj (apud la Nigra Maro en Varna Bulgario). Tie mi havis la okazon konatiĝi pli bone kun la laboroj de la Federacio kaj konstati ke oni tre alte taksas nian Asocion en la kadro de la Federacio (kvankam ili tre malmulte scias pri Esperanto kaj oni tie devas — kaj oni povas — multe labori por forigi la timon pri kapablo de Esperanto esti bona esprimilo por scienca verkado).

La Mondfederacio de Sciencaj Laboristoj eldonadas la revuon »Scienca Mondo«, en la nuna momento en 6 lingvoj, kun la intenco ankoraŭ pligrandigi la nombron de la eldonoj. La revuo aperas 4

foje jare (po 32 paĝoj en formato iom pli granda ol tiu de la Scienca Revuo), sed post unu jaro oni transiros al 6 samampleksaj numeroj jare. En la revuo aperas parte la artikoloj tre similaj al tiuj en la Scienca Revuo, sed sur plej alta popularscienca nivelo. Krom tio ĝi aperigas artikolojn pri rolo de scienco kaj de sciencistoj en la nuna mondo, pri laborkondiĉoj de sciencistoj, pri libereco por scienca verkado ktp. Sed ĝi ne aperigas originalajn esplorrezultatojn, kiel iam faras la Scienca Revuo.

Mia ideo estas ke ni provu unuigi Sciencon kaj Scienca Revuon. Kunlige kun la jam dirita rolo de la teknikistoj en ISAE, oni povus nomi la revuon »Scienca kaj Teknika Mondo«. En ĝi povus konstante aperadi ĉiuj artikoloj kiuj aperas en la Scienca Mondo (inter ili ankaŭ artikoloj verkotaj de membroj de ISAE), sed ankaŭ nemultaj originalaĵoj de esperantistaj sciencistoj kaj la artikoloj kun prilingvaj temoj. Tiel fakte la nova revuo estus la Esperanto-eldono de la Scienca Mondo, sed iom pli larĝa, dum la aliaj (nacilingvaj) eldonoj restus tial kiaj ili estas (kun la jam menciita kunlaboro ankaŭ de scienculoj el ISAE, kiam ili pritraktas iun pli ĝeneralan temon).

La amlekso de la nuna Scienca Revuo per tio preskaŭ duobligus (pro 6 numeroj jare kaj pro la iom pli granda formato) kaj oni havus tre imponan revuon. La materialo por 32 paĝoj estus konstante prizorgata de la Redakta Komitato de la Scienca Mondo kaj la redaktoro de la Esperanta eldono devus zorgi nur por la 8-paĝa aldono por ĉiu numero (kaj instigadi membrojn de ISAE, verki pli multe ankaŭ por la ĉefa parto de la revuo).

Kun tia revuo ISAE ne restos inter siaj kvar muroj, sed ĝi elirus en la vastan sciencistan mondon. De la plua aktiveco de la membroj, dependas ĉu oni bone utiligos tian avantaĝon. Unu el tiaj aktivecoj povus esti utiligo de Esperanto kiel pontlingvo por ĉiuj eldonoj (nacilingvaj) de la Scienca Mondo. Mi tiu menciis ke, sekonsidere ĉu la ideo pri la komuna revuo iam realiĝos aŭ ne, estas entreprenitaj paŝoj ke oni faru la »eksperimenton« por traduko de kelkaj artikoloj de la Scienca Mondo pere de Esperanto al aliaj lingvoj. Se la »eksperimento« konvinkos la eldonantojn de la Scienca Mondo ke Esperanto taŭgas kiel la pontlingvo, oni utiligos ĝin tiucele.

Jen la ideo kiu unigas la rezultatojn de la unua diskutado pri la Scienca Revuo kaj aldonas ion novan, sufiĉe kuraĝan kaj pretendan, sed ali mi ŝajnas plene realigeblan. Bonvolu pridiskuti ankaŭ ĉi tiun ideon. Se la plimulto favoros ĝin, la Scienca Revuo povas post la 20-a volumo montriĝi (revestota kaj pligrandigota) kiel Scienca kaj Teknika

Mondo (kompreneble ankaŭ la nomo estas diskutenda — ĉi tiu nomo estas nur la propono!).

Redaktado, administrado kaj financado

Enhavo de la revuo estas la ĉefa kondiĉo por ĝia vivo. Pri tio oni ne rajtas dubi. Kia ajn estu la fizionomio de la revuo, unufaka aŭ plurfaka, popularscienca aŭ kun alta scienca nivelo, la enhavo estu ĝiuokaze bonkvalita, interesa, instrua — tio estas la ĉefa afero. Sed ĝuste el la spertoj kun la Scienca Revuo mi devas emfazi ke preskaŭ la samrangan signifon kun la enhavo de la revuo havas ĝiaj redaktado, administrado kaj financado.

La Scienca Revuo eniris grandan krizon post la rifuzo de la antaŭa privata eldonisto aperigadi ĝin plue. ISAE tiam transprenis la revuon. Post forigo de la unuaj malfacilaĵoj, mi klopodis redakti ĝin tiel ke la legantoj estu kontentaj. Zorgeme mi sekvis ĉion eldiritan pri la revuo, klopodante apartigi la seriozan kaj bonintencan de la »kritiko pro kritiko«, doni al la enhavo ĉiam pli belan aspekton, kontentigi la aŭtorojn kaj la legantojn. Kaj la revuo travivis la krizon, la nombro de la abonantoj kreskadis, malgraŭ la fakto ke ofte oni ne havis kion elekti el la manuskriptoj, sed oni enmetis tion kion oni havis!

Paralele kun tio la administrado devas funkcii akurate. La aboninto devas regule ricevi tion kion li abonis, kontraŭe li (ŝi) sen-interesiĝos, aŭ eĉ prave koleros kaj ĉesos abonadi la revuon. La neordemajn abonantojn oni devas afable averti, iam daŭrigi la sendadon eĉ sen la renovigita abono (precipe eĉ la plurjaraj abonintoj), sed tamen havi bonan evidencon kion li (ŝi) pagis kaj kion ne. Se la evidenco pri la abonoj estas bona, oni baldaŭ akiras la fidon je la asertoj pri la pago aŭ nepago. Ekzistas homoj kiuj ne multe zorgas pri tio kaj ili pli ŝatas pagi kiam oni postulas tion ol zorgi. Sed ekzistas ankaŭ tre akurataj homoj, kiuj ĝuste konas la staton de siaj pagoj. Kaj la administranto tuj perdos la fidon de tiu abonanto se li postulos la pagon pri la jam pagita. Eviti ĉion tion oni povas per bona administrado, per bona evidenco pri ĉio.

Tiuflanke la delegita reto de ISAE ludis kaj ludas gravegan rolon. En lando kun bona delegito, post ordigo de la laboroj en la

sekretariejo, oni havis neniajn malfacilaĵojn. Tute kontraŭe oni devis multege administri se la delegito estis neordema aŭ neakurata.

La revuoj en Esperanto povas esti aŭ memfinancataj aŭ mecenataj de pluraj unuopuloj. Nenian subvencion ili povas akiri (almenaŭ ne ĝis nun). Elspezadi ŝpareme, alvokadi al la donacado (ni ne diru almozpeti!) estas konstanta apero en la vivkomenco de la revuo. Precipe por la unufakaj revuoj estas nepre necesa la oferemo de entuziasmoj por sia fako (kaj por la internacia lingvo). La komencaj financaj malfacilaĵoj estas grandegaj. Sed ĉefa afero estas elteni la komencajn jarojn — poste ĉio iras pli glate. Pro tio ankaŭ la prunteprenoj (se iu pretas pruntedonadi, kiel mi mem faris por la Scienca Revuo) estas bonvenaj. Se la revuo estas vivkapabla, ĝi redonos la ŝuldojn.

Aldonu al ĉio tio la malfacilaĵojn pri la transpagoj el pluraj landoj kaj oni vidos la gravecon ke la administrado kaj la delegita reto estu komunaj por ĉiuj revuoj en Esperanto. La revuoj kiuj ne faras tiel, **riskas fiaskon, ne pro io esenca sed pro la administrado.** Ni ne rajtas bremsi ekaperigon de pluraj fakaj revuoj en Esperanto, sed ni devas helpadi ilin. Kaj ni povas fari tion nur per la komuna administrado, komuna delegita reto kaj komuna informado de la legantoj. Se ni faros tiel ĉiam, ni atingos la staton ke, apud unu ĝenerala revuo, ni havos por ĉiu fako apartan revuon.